



VALENCIO (HISPANUJO)



La korespondaĵojn, abonojn kaj ĉiujn aferojn pri la gazeto, oni adresu

Al Sinjoro Direktoro-administranto de

La "Suno Hispana,,

Carniceros, 3

VALENCIA (ESPAÑA)

organo de la hispana societo por la

ĉiunmonata gazeto,

propagando de la lingvo internacia

LA SUÑO HISPANA

Organo de la Sociedad Española para la propagación del Esperanto

SE PUBLICA MENSUALMENTE

KOSTO DE LA ABONO

En Eksterhispanaj landoj: Unu jaro, tri frankoj, kaj unu numero, **0'30** frankoj, pagataj per papermono, per kambio, aŭ per poŝtmarkoj, el kiu ajn lando.

En Hispanujo: Unu jaro, tri pesetoj kaj unu numero, **0'30** pesetoj, pagataj per mono, per kambio, aŭ per poŝtmarkoj de korespondado.

Oni akceptas la abonojn de kiu ajn dato, sed nur por almenaŭ unu tuta jaro.

PRECIO DE LA SUSCRIPCIÓN

En el Extranjero: Un año, tres francos y un número, **0'30** francos, en papel moneda, letra ó sellos de cualquier país.

En España: Un año, tres pesetas y un número, **0'30** pesetas, en moneda, letra ó sellos de correspondencia.

Se admiten suscripciones desde cualquier fecha, pero por lo menos de un año.

KOSTO DE LA ANONCOJ

	Paĝo	4'80
Duono	da »	2'70
Kvarono	» »	1'55
Okono	» »	0'85
Deksesono	» »	0'50

Tiuj-ĉi kvantoj rilatas al frankoj aŭ pesetoj, laŭ la frenda aŭ hispana loĝejo de la anoncantoj.

Rabatoj da 5, 10 kaj 20 % en abonoj po tri, ses kaj dekdu anoncoj.

PRECIO DE LOS ANUNCIOS

	Página	4'80
$\frac{1}{2}$	»	2'70
$\frac{1}{4}$	de »	1'55
$\frac{1}{8}$	» »	0'85
$\frac{1}{16}$	» »	0'50

Estas cantidades se refieren á francos ó pesetas, según que los anunciantes residan en el Extranjero ó en España.

Rebajas de 5, 10 y 20 % en abonos por tres, seis y doce anuncios.

LA SUNO HISPANA

Al kelkaj

Amikoj fremdaj kaj hispanaj al kiuj ni petis verkaĵojn por nia revuo, kaj aliaj propramove, promesas al ni honori ĝiajn kolonojn per iliaj laboroj. Dankon al ĉiuj.

Samtempe por ke la presado de iliaj estimindaj verkoj ne estos malhelpontaj, ni devas petegi al tiaj protektantoj ke ili ne forgesu nian programon presitan en la numeroj 1^a kaj 13^a de nia gazeto kaj ke la verkaĵoj devas enhavi pli malpli kvincent da vortoj.

Ankaŭ ni dezirus ke LA SUNO HISPANA ne pritaktus pri reformoj kaj plibonigoj de Esperanto. Ni, ja, sciigos kion diros nia kara majstro.

Ni estus feliĉegaj, se la pli famaj esperantistoj ankaŭ honorus ĝin per siaj verkoj kaj nomoj, kaj se ni ne faras al ili, tute rekte, tiun peton, estas pro la respekto kiu kaŭzas al ni ilia esperantista rango.

LA REDAKCIO.

A varios

Amigos extranjeros y españoles á quienes hemos pedido escritos para nuestra revista, y otros de motu proprio, nos han prometido honrar estas columnas con sus trabajos. Gracias á todos.

Al mismo tiempo debemos rogar á tales protectores, para que la inserción de sus estimables obras no ofrezca dificultad, que no olviden nuestro programa impreso en los números 1.º y 13.º de nuestro periódico y que las composiciones deben contener poco más ó menos quinientas palabras.

También desearíamos que LA SUNO HISPANA no tratara de reformas y mejoras del Esperanto. Nosotros, desde luego, daremos á conocer lo que diga nuestro maestro.

Nos sería gratísimo que los más importantes esperantistas honraran también nuestras columnas con sus escritos y nombres, y si no les hacemos esta petición directamente, es por el respeto que nos causa su rango esperantista.

LA REDACCIÓN.

Grava avizo

Ni petas la sinjorojn al kiuj ni sendos tiun ĉi numeron, ke se ili ne volas aboni ili ĝin resendu al ni, kaj se ili abonas, ili faru l'abonpagon aŭ eĉ diru al ni, ke ili estas abonantoj kaj pagos. Alie, ni ne povos daŭrigi al ili la sendadon de nia gazeto.

Aviso importante

Pedimos á los señores á quienes enviaremos este número, que si no quieren abonarse nos lo devuelvan, y si se abonan, hagan el pago del abono, ó al menos nos digan que son abonados y pagarán. De otra manera, no podremos continuar remitiéndoles nuestro periódico.

D-ro Zamenhof al kapitano Capé⁽¹⁾

Kara sinjoro!

Vian manuskriptan artikolon mi legis kaj hodiaŭ mi ĝin resendis al vi. La malĝojaj ideoj, kiujn vi esprimis pro la novaj vortoj en la laste aperintaj vortaroj, ŝajnas al mi tute senkaŭzaj; laŭ mia opinio via timo venis nur de tio, ke vi ne tute ĝuste prezentas al vi la esencan signifon de tiuj pligrandigitaj vortaroj.

La novaj vortaroj ne havas eĉ la plej malgrandan intencon detrui la unuecon de nia lingvo. La sola kaj netuŝebla fundamento de nia lingvo ĉiam restas la «Universala Vortaro» kaj la novaj vortaroj ne ŝangas eĉ unu vorton el tiu fundamenta vortaro; ilia celo estas nur doni klarigon kaj helpon en tiuj okazoj, kiam la Universala Vortaro ne sufiĉas. Estas dezirinde, ke tiun ĉi ideon la novaj vortaroj akcentu tute klare en siaj antaŭparoloj, por eviti ĉian malkomprenigon.

La ĉefaj principoj de la vortouzado en Esperanto estas la sekvantaj:

a) Ĉiu vorto, kiu troviĝas en la Universala Vortaro estas legdona por ĉiuj esperantistoj, kaj neniu en la mondo, nek la aŭtoro de Esperanto nek ia alia esperantisto havas la rajton fari en tiuj vortoj ian ŝanĝon, (se ekzemple anstataŭ «ŝipo» iu uzas la vorton «navo» ĉar la vorto «ŝipo» al li «ne plaĉas»—tio estus rekta peko kontraŭ la unueco de nia lingvo kaj ĉiuj esperantistoj tiam protestus).

b) Se vorto per si mem estas *internacia*, tiam laŭ la regulo 15 de nia gramatiko ĉiu havas la rajton uzi tiun ĉi vorton, kvankam ĝi ne troviĝas en la Universala Vortaro. (Ekzemple neniu povus protesti kontraŭ la uzado de la vortoj «aŭtoro», «telegrafo» k. t. p., kvankam ili ne troviĝas en la Universala Vortaro.)

(1) El *Lingvo Internacia*, n.º 11, Novembro 1904.

El Dr. Zamenhof al capitán Capé⁽²⁾

Querido señor!

He leído el artículo manuscrito de usted, y hoy se lo devuelvo. Las tristes ideas que V. emite con motivo de las nuevas palabras en los diccionarios, que han aparecido últimamente, me parecen por completo inmotivadas; según mi opinión, el temor de V. procede de que usted no se hace cargo perfecto de la esencial significación de estos diccionarios aumentados.

Los nuevos diccionarios no contienen la menor intención de destruir la unidad de nuestra lengua. El único intangible fundamento de nuestra lengua es siempre el «Diccionario Universal» y los nuevos diccionarios no cambian ni una palabra de este Diccionario Universal; el fin de ellos es sólo dar claridad y auxilio en aquellas ocasiones en que no basta el Diccionario Universal. Es de desear, que los nuevos diccionarios expresen con toda claridad esta idea en sus prefacios, para evitar toda mala inteligencia.

Las principales bases para el uso de palabras en Esperanto, son las siguientes:

a) Cada palabra que forma parte del Diccionario Universal es obligatoria para todos los esperantistas, y nadie en el mundo, ni el autor del Esperanto, ni ningún otro esperantista, tiene derecho a hacer cambio en esas palabras, (si por ejemplo, en vez de «ŝipo» alguno usara la palabra «navo», porque la palabra «ŝipo» *no le agrada*, eso sería directa y grave falta contra la unidad de nuestra lengua y entonces todos los esperantistas protestaríamos).

b) Si una palabra es por sí misma *internacional*, en ese caso, según la regla 15 de nuestra gramática, cada cual tiene derecho de usar esta palabra, aun cuando no se la encuentre en el Diccionario Universal. (Por ejemplo, nadie podría protestar contra el uso de las palabras «aŭtoro», «telegrafo», etc., aun cuando

(1) De *Lingvo Internacia*, n.º 11, Noviembre 1904.

c) Sed se ia vorto nek estas sendube internacia nek havas por si apartan radikon en la Universala Vortaro kaj esprimi ĝin per kunmeto de radikoj jam ekzistantaj estas aŭ tute ne eble, aŭ tro neoportune, aŭ teknike ne precize,—tiam tiun ĉi vorton ĉiu aŭtoro povas mem krei laŭ sia bontrovo, tiel same kiel oni ĝin faras en ĉiu alia lingvo. Tiu ĉi permeso estas *necesa*, ĉar alie la lingvo estus tro rigida kaj multajn ideojn oni tute ne povus esprimi en ĝi. Sed ĉar ne ĉiuj personoj povas mem krei al si vortojn kaj ĉar estas dezirinde ke ĉiuj uzu la novajn vortojn kiom eble *egale*, tial ĉiu nove aperanta vortaro ordinare enhavas en si kelkan nombron da novaj vortoj sub la kontrolo de l' aŭtoro de Esperanto, por ke ili povu alporti helpon al ĉiuj, kiuj bezonas novajn vortojn kaj ne volas ilin krei ĉiu arbitre kaj diversmaniere laŭ sia bontrovo. Sed tiuj ĉi novaj vortoj, kiuj ne troviĝas en la Universala Vortaro, estas nur *private rekomendataj*, sed tute ne *oficiale ordonataj*! Nur rekomendataj, ne altrudataj! Kiu trovas ilin bonaj, povas ilin uzi,—kiu trovas ilin ne bonaj, povas ilin ne uzi kaj anstataŭigi per iaj aliaj vortoj. Sed pro la unueco de nia afero estas kompreneble dezirate, ke oni anstataŭu ilin per aliaj vortoj nur en okazo de ilia efektiva *malboneco*, sed ne pro simpla persona kapricio.

*

Vi diras, ke la aperado de novaj vortoj faras la lingvon pli malfacile ellernbla. Sed kial? Ili ja tute ne elpuŝas la antaŭajn vortojn kaj ne ŝanĝas en io la ĝisnunajn principojn de la Esperanta vortaro. Ili ja servas nur pro la okazoj de efektiva *bezono* kaj garantias kontraŭ la Babilona confuzo, kiu aperus se en okazoj de bezono ĉiuj aparte kreus vortojn *malegalajn*: sed kiam oni tiujn vortojn

no se encuentren en el Diccionario Universal).

c) Pero si alguna palabra no es indudablemente internacional, ni tiene por sí especial raíz en el Diccionario Universal, y expresarla por unión de raíces ya existentes, es totalmente imposible, ó demasiado molesto, ó no se ajusta al tecnicismo, entonces esta palabra puede cada autor crearla por sí mismo, según su buena elección, de la misma manera que se hace en cualquiera otra lengua. Este permiso es *necesario*, porque de otro modo la lengua sería muy rígida y muchas ideas no podrían en absoluto expresarse en ella. Pero porque no todas las personas pueden crearse palabras por sí mismas y porque es de desear que todos usen las nuevas palabras *por igual*, en cuanto sea posible, cada nuevo diccionario que aparece contiene ordinariamente cierto número de palabras nuevas, sometidas á la comprobación del autor del Esperanto, para que puedan proporcionar ayuda á todos los que necesitan nuevas palabras y no quieren crearlas arbitrariamente y de diversos modos, á su parecer. Pero estas nuevas palabras que no se encuentran en el Diccionario Universal, son solamente *recomendadas privadamente*, pero no *ordenadas oficialmente*! Sólo recomendadas, no impuestas! El que las encuentre buenas, puede usarlas—el que no, puede no usarlas y sustituirlas por cualesquiera otras palabras. Pero para la unidad de nuestro asunto es de desear, naturalmente, que se sustituyan por otras, solamente en el caso de su efectiva *impropiedad*, pero no por el simple capricho personal.

*

Dice V. que la aparición de nuevas palabras hace la lengua más difícil de aprender. Pero por qué? Ellas de hecho no rechazan por completo las anteriores y no cambian en nada los principios seguidos hasta ahora para la formación de palabras en Esperanto. Sirven sólo para los casos de efectiva *necesidad*, y garantizan contra la babilónica confusión que aparecería si en casos de necesidad, todos,

ne bezonas, oni ilin ne uzas. *Malbonaj* aŭtoroj trouzos la uzadon de tiaj vortoj, sed sen ili la malbonaj aŭtoroj ja ankoraŭ pli multe difektus la lingvon; *bonaj* aŭtoroj aŭkaŭ nun skribas tiel same klasike kiel antaŭe, kaj se vi prenos ian bonan verkon varbitan nun kaj alian bonan verkon skribitan antaŭ 10 jaroj, kiam ne ekzistis ankoraŭ la vortaroj de Beaufront, Cart, Jürgensen-Pagnier kaj aliaj, vi vidos, ke la lingvo en ambaŭ versioj estas tute egala kaj en la daŭro de sia tuta ekzistado la lingvo neniom ŝanĝiĝis.

Vi timas, ke la posedanto de franca vortaro ne komprenos la posedanton de la iom pli plena vortaro germana, —sed via timo estas nur *teoria*; faru *provon*, kaj vi vidos, ke ambaŭ reciproke komprenos sin perfekte. Ĉiufoje kiam aperas nova eldono de la vortaro en ia lingvo, ĝi enprenas en sin ĉiujn novajn vortojn kiuj ekzistas jam en la aliaj vortaroj, kaj tiamaniere la vortaroj en diversaj lingvoj tute ne diferencas inter si kaj tamen la lingvo konstante ĉiam pli kaj pli riĉiĝas, sen ia ŝarĝado de la lernanto (ĉar la plej granda parto de la novaj vortoj estas aŭ pure internaciaj, kiujn la vortaroj ne kreas sed nur fiksas, aŭ vortoj speciale-sciencaj kaj teknikaj, kiujn la ordinara lernanto ne bezonas).

Mi tamen ripetas, kion mi supre diris: *oficiala* parto de la lingvo devas ĉiam resti nur la Universala Vortaro kaj la 16 reguloj de la gramatiko; ĉio alia, kion mi faras aŭ faros, devas esti rigardata ĉiam kiel farado *privata*, por neniu deviga. Sekve ankaŭ la novaj vortoj en la vortaroj estas de mi nur *private rekomendataj* (por ebligi kiel eble plej grandan unuecon en nia afero), sed ne *oficiale altrudataj*. Sekve se la esperantistoj per reciproka konsiliĝado venus al komuna interkonsento, ke la novaj vortoj devas esti evitataj aŭ anstataŭigataj per iaj aliaj,

cada cual por su lado, crearan palabras *desiguales*; pero cuando esas palabras no se necesitan, no se usan. *Malos* autores abusan del uso de esas palabras, pero sin ellas los malos autores también estropearían mucho más la lengua; los *buenos* autores también *ahora* escriben de la misma manera clásica que antes, y si V. toma una buena obra de ahora y otra buena obra escrita hace 10 años, cuando aún no existían los diccionarios de Beaufront, Cart, Fürgensen-Pagnier y otros, V. verá que el idioma en ambas obras es completamente igual y que durante toda su existencia nada ha cambiado en absoluto.

Teme V. que el poseedor de un diccionario francés no comprenda al poseedor del algo más completo diccionario alemán—pero el temor de V. es solamente *teórico*; haga V. la prueba y verá V. como ambos recíprocamente se entenderán perfectamente. Cada vez que aparece una nueva edición de un diccionario en alguna lengua, contiene todas las nuevas palabras que existen ya en los otros diccionarios, y de esa manera, los diccionarios de las diversas lenguas en nada se diferencian entre sí, y sin embargo, el idioma, constantemente, siempre más y más se enriquece, sin ningún recargo para el estudiante (porque la mayor parte de las nuevas palabras son, ó puramente internacionales, que los diccionarios no crean, sino solamente fijan, ó palabras especialmente científicas y técnicas, las cuales el estudiante de ordinario no necesita).

Sin embargo, yo respeto lo que antes dije: la *parte oficial* de la lengua debe siempre ser sólo el Diccionario Universal y las 16 reglas de la gramática; todo lo demás que yo hago ó haré debe ser mirado siempre como hecho *privado*, para nadie obligatorio. Por consiguiente, también las nuevas palabras en los diccionarios son sólo *recomendadas privadamente* por mí (para facilitar en lo posible la mayor unidad en nuestro asunto), pero no *oficialmente impuestas*. Por lo tanto, si los esperantistas, por recíproco consejo vinieran al común acuerdo de que las

—mi nenion havos kontraŭ tio ĉi (1). Laŭ mia opinio kaj deziro, en Esperanto devas ekzisti ne persono leĝdonanta, sed nur ia unu fojon por ĉiam elektita *libro* leĝdonanta; ĉiuj miaj opinioj ne esprimi-tar en la gramatiko kaj Universala Vortaro devas esti rigardataj ne kiel leĝoj, sed nur kiel *konsiloj de la plej kompetenta esperantisto*.

Kun kora saluto

via
L. ZAMENHOF.

nuevas palabras deben ser suprimidas ó sustituidas por otras—yo nada diré contra esto (1). Según mi opinión y deseo, en Esperanto debe existir no una persona que legisle, sino de una vez para siempre algún *libro* legislador elegido; todas mis opiniones no expresadas en la gramática y Diccionario Universal deben ser miradas no como leyes, sino sólo como *consejos del esperantista más competente*.

Con cariñoso saludo, de V.,

L. ZAMENHOF.

En Petersburgo

Mi iras laŭ la Neva strato (2). Estas malvarme. La stratoj estas kovritaj je neĝo, la vojoj estas glitigaj. Ĉiuj rapidas en siaj peltoj kun altaj felaj kolumoj. Kuraĝuloj-knaboj staras sur la trotuaro senĉese pacience elparolante saman frazon: «Jen bona libro kun interesaj rakontoj, anstataŭ unu rublo, po^odek kopekoj». Aliloke, iu vendas novajn gazetojn telegramojn, ekkvianta: «Oficiala telegramo el la malproksima Oriento. Sanga batalo kun japanoj. Dek mil da mortigitoj», k. t. p. Tie, amase la popolo legas pendigitaj sur la muro novaĵojn pri la milito. La piaj malnobeluloj haltas antaŭ la preĝejo kaj depreninte ĉapojn faras krucsignojn. En la apuda strato oni vendas abioĵa por la alvenanta kristnasko. Patrinoj rapidas aĉeti diversajn donacetojn al siaj gefiloj por la granda festo. «Panjo, panjo, mi volas iri hejmen, esploras infano, estas malvarme». La masivaj monumentoj al la rusaj herooj Kutuzov kaj Barclay-de-Folly, sen peltoj nur en uniformoj dum tiu ĉi malvarmo fiere staras, altirinte manon, antaŭ la granda Kazan'a preĝejo, simila al la Petra en Romo. Ekzistas eĉ rusa versa linikvaro signifanta: «Kutuzov savis Ruslandon de la francoj, pro tio lin la rusoj elmetis al

(1) La publikigado de via artikolo sekve estas por mi absolute nenia malagrablaĵo.

(2) Ĉefa en Petersburgo.

En Petersburgo

Voy por la calle de Neva (2). Hace frío. Están las calles cubiertas de nieve, los caminos resbaladizos. Todos van de prisa dentro de sus gabanes con altos cuellos de pieles. Valerosos muchachos permanecen en la acera diciendo pacientemente y sin cesar la misma frase: «Buen libro con interesantes narraciones, en vez de un rublo á diez copecs». En otra parte alguien vende actuales periódicos telegráficos, exclamando: «Telegrama oficial del extremo Oriente. Sangrienta batalla con los japoneses. Diez mil muertos», etc. Allí el pueblo amontonado lee, fijadas en la pared, noticias sobre la guerra. La gente piadosa se detiene ante la iglesia y quitándose la gorra se santigua. En la calle adjunta se venden abetos para la próxima Navidad. Las madres se apresuran á comprar diversas chucherías á sus hijos para la gran fiesta. «Mamá, mamá, quiero irme á casa, lloriquea un niño, hace frío.» Los macizos monumentos á los héroes rusos Kutuzov y Barclay-de-Folly, sin capotes, sólo de uniforme (á cuerpo), con gentileza permanecen con este frío, levantando la mano ante la gran iglesia de Kazan, parecida á la de San Pedro en Roma. Hasta hay una cuarteta rusa que dice: «Kutuzov salvó á la Rusia

(1) La publicación del artículo de V. sería por consecuencia para mí cosa nada desagradable.

(2) La principal de Petersburgo.

la frostoj». Diverskoloraj elpendaĵoj ĉe magazenoj kvazaŭ penas gajigi la rigardon. En la aero mi vidas nebulon, la malvarmo malgraŭ varma vestaro malhelpas spiradi. Malafable vin renkontas la naturo, ĝi ne karesas, sed pelas vin. Mi ne amas la severan Nordon, la ĉarma, mal-sobriga Sudo pli forte min allogas. Tra la stratoj ĉiumomente flugas aŭtomobiloj, bicikloj. Jen larĝa, riĉa glitveturilo, post kiu staras sur la planketo ornamita lakeo. Jen knabino, petanta almozon, jen knabo, frapanta alian, ĉar tiu forprenis de li pomon ŝtelitan ĉe l' pomvendistino. La maljunulino protestis, ekminacis, sed ne sentis energion persekuti la ŝtelisteton. En ĝardeno sur la glaciĝinta tero glitas gejunuloj sur glitŝuoj, jen glitveturileto malsupren ĵetiĝinta kun gaja knabo, de artefarita glacia monto. La preĝejturo sonoras ses horojn. La aristokratara ek-malestas sur la stratoj, ĝi foriĝis por vespermanĝi kaj poste, eble, veturi al balo aŭ teatro. Nu, leganto, antaŭ ol manĝi ni rigardu la Nevon, la belan riveron de l' rusa ĉefurbo. Somere aŭ vintre, tage aŭ vespere ĝi ĉiam prezentas admirigan pentraĵon. Larĝa rivero nun tute glaciĝinta, per sia vasteco, per sia masiveco de l' glacio, per la fortaj granitaj bariloj de l' bordo, alvokas minacan impreson de io fortika, nedtruebla. Sur la bordoj jen altas la admiralejo kun ĝia akra pinto kies supraĵo prezentas ŝipon, jen la peza, larĝa Isaak'a preĝejo, jen la monumento de l' energio. Petro granda per sia vigla rigardo admiranta sur ĉevalo sian kreitaĵon, jen la Petropaŭla fortikaĵo kun piramida ora supro, jen, jen, senfinaj preĝejoj kvazaŭ forflugantaj de la tero, kvazaŭ alkondukantaj al la ĉielo. Sed nun ni revenu, leganto, hejmen, ĉar estas jam malfrue kaj la kviristo jam longe nin atendas kun la pre-paritaj manĝoj.

Esperanta originalaĵo de G. KOLOWRAT.

de los franceses, y por eso los rusos lo expusieron al hielo». Objetos de diversos colores expuestos en los almacenes parece que se esfuerzan en alegrar la vista. En el aire veo niebla, el frío á pesar de la ropa de abrigo dificulta la respiración. La naturaleza os sale al encuentro de manera descortés; no os acaricia, sino os repele. No me gusta el severo Norte; el encantador y abundoso Sur me alhaga muchísimo más. A través de las calles á cada momento vuelan automóviles, bicicletas. He ahí un ancho, rico trineo, en cuya parte posterior va en el estribo un lacayo de gala. Ved una muchacha pidiendo limosna, mirad un muchacho pegando á otro porque le quitó una manzana que él robó á la vendedora de ellas. La vieja protestó, amenazó, pero no se sintió con energía para perseguir al ladronzuelo. En un jardín, sobre la tierra helada se deslizan jóvenes sobre patines: he ahí un trineito, lanzándose hacia abajo con un alegre muchacho, desde un monte de hielo artificial. La torre de la iglesia da las seis. La aristocracia empieza á ausentarse de las calles, se va á comer, y luego, probablemente, al baile ó al teatro. Bien, lector, antes de comer veamos el Neva, el hermoso río de la principal ciudad rusa. En invierno ó en verano, de día ó de noche, siempre presenta admirable paisaje. El ancho río, ahora completamente helado, por su extensión, por su espesor de hielo, por los fuertes malecones de granito de la orilla, produce una amenazadora impresión de algo robusto, indestructible. Sobre las orillas, el almirantazgo se eleva con su agudo remate cuya parte superior representa un buque; he ahí la pesada, ancha iglesia de Isaac, allí el monumento de la energía, Pedro el Grande con su ojo avizor admirando á caballo su creación; he ahí la fortificación de Pedro Pablo, fortificación con una pirámide de oro encima; ved, ved infinitas iglesias que parece como si volaran desde la tierra, como si se dirigieran al cielo. Pero ahora, volvamos, lector, á casa, porque ya es tarde y el cocinero hace tiempo que nos espera con los manjares preparados, *Hispanigis, E. 10.072.*

EL KIĤOTO

ANTAŬPAROLO

Senokupa leganto: mi dezirus—kaj senjure vi povos kredi al mi—ke tiu ĉi libro, kiel filo de la intelekto, estu la plej bela, la plej graciplena kaj la plej diskreta el ĉiuj imageblaj. Sed mi ne povis malobei la naturan leĝon, ke ĉio en naturo naskas similaĵon. Kaj tiel, kion povus naski mia sprito senfrukta kaj nesufiĉe kulturita se ne historion de malgrasa, kuntiriĝa kaj kaprica filo plena je pensoj diversaj kaj de iu ajn neniam imagitaj kaj tia, kia povas naskiĝi en malliberejo, kie ĉiu ĝenaĵo trov^{as} difinitan por si lokon kaj loĝas ĉiu malgaja bruo? La senagiteco, kvieta loko, amuzeco kampara, sennubeco de la ĉielo, murmurado de la fontoj kaj spirita trankvileco multe kunhelpas por ke la plej senfruktaj muzoj montriĝu produktemaj kaj prezentu kreaĵojn supersatigantajn la mondon per miro kaj kontento. Okazas ofte ke patro, kiu havas malbelan kaj sengracian filon, blindiĝite de la amo, kiun li havas por li, ne vidas liajn malbonaĵojn, tute alie, ŝatas ilin kiel saĝaĵojn kaj belajojn kaj ilin raporta^s al siaj amikoj kiel spritaĵojn kaj ĉarmoĵojn. Sed mi, ŝajna patro kaj vera duonpatro de Don Kiĥoto, ne volas konduki laŭkutime nek petegi vin, karega leganto, preskaŭ kun larmoj en la okuloj, kiel aliaj faras, ke vi pardonu aŭ ne atentu la malbonaĵojn rimarkatajn en mia filo, ĉar vi nek parenco nek amiko lia estas, animon havas ĉe via korpo kaj plena agliberon, estas en via hejmo kie vi ĉefas same kiel la reĝo estas majstro de siaj fortikaĵoj kaj ankaŭ vi scias kion oni diras kutime: «kaŝate de mia mantelo mi mortigas la reĝon». (1) Ĉio ĉi senigas kaj liberigas vin je ĉiu respekto kaj devigo kaj tiel, vi ion ajn povos diri pri tiu ĉi historio ne timante kalumnion aŭ premion pro via malfavora aŭ favora juĝdiro.

Nur mi dezirus al vi prezenti ĝin sensuperflua, nuda kaj ne ornamita de antaŭparolo nek de katalogo kaj sennombreco da kutimaj sonetoj, epigramoj kaj laŭdoj, kiujn oni ofte antaŭmetas je komenco de la libroj. Ĉar mi povas diri al vi, ke, malgraŭ la klopodo postulita de ĝia verkado, nenio ŝajnis al mi pli pleniga ol elfari ĉi tiun antaŭparolon, kiun vi nun tralegas. Por verki ĝin, mi prenis la plumon multfoje, kiun mi forlasis multajn fojojn, nesciante kion skribi; kaj foje, kiam mi estis halte, kontraŭ la verkpapero,⁴ tenante plumon sur la orelo, kulbuton apogitan sur la skribotablo kaj mano sub la vango, dum mi pripensis kion mi pridirus, eniris senatende amiko mia, lerta kaj sprita, kiu vidante ke mi estas tiel imagema, demandis min pri la kialo, kaj ne kaŝante ĝin, mi diris al li ke mi pripensas la verkotan antaŭparolon por la historio de Don Kiĥoto kaj ke ĝi tiel multe embarasas min ke mi ne volas elfari ĝin nek publikigi la heroaĵojn de tiel nobla kavaliro.

Esperantigis V. I. O.

(1) Hispana popoldiro.

Bibliografio

L'AVARULO, *kvinakta komedio el Moljero, tradukis Samuel Meyer*. Librejo Hachette kaj K.^o Parizo. Prezo: 0^o75 frankoj.

Ni fine, plej plezure vidas publikigita la ĉefverkon de la korekta tradukinto de «Vojaĝo interne de mia ĉambro». Jam estis tempo! Kiam ni legis en «L'Esperantiste», ke oni aljuĝis unuan premion de la dua konkurso literatura malfermita de la franca Societo por propagando de Esperanto, al la traduko de la glora Moljero komedio, ni tuj supozis, ke ĝi estas vera juvelo literatura kaj ekzantis deziregon legi tian rimarkindan produktajon. Du jarojn ni atendis, sed la ravo, kiun sentigas la atentado pri la belaĵoj de tiel ĉarma komedio sufiĉe rekompencas tian longan atendadon.

En «L'Avarulo» oni admiras fidelegan tradukon, elegantan kaj puran stilon kaj neriproĉeblan korektecon. Sufiĉas kompari tradukon kun originalo por konvinkigi, ke ĉiuj nuancoj eldiraj, beleco kaj intereso de la komedio reaperas kun la ĉarmoj, kiujn liveras idiomo tiel riĉa kaj delikata kiel Esperanto. «L'Avarulon» oni povas elmontri al ĉiuj, kiuj dubas pri la lingvaj rimedoj de idiomo artefarita, por plene elpruvi al ili, ke la kreaĵo de D-ro Zamenhof nenion trovas por envii en niaj lingvoj pri la esprimado de ple diversaj kaj akregaj nuancoj.

Verkoj kiel «L'Avarulo» estas necesaj por ke Esperanto atingu la universalan krediton, kiun postulas la mondo por ĝin alpreni unuanime kaj estas tre dezirinde ke la plej bonfamaj Esperantistoj traduku la literaturajn ĉefverkojn el siaj gepatraj lingvoj, por ke la internacia lingvo plej intime disvastigu en ĉiuj landoj.

Extrait de l'Histoire universelle por L. Conturat, docteur es lettres et L. Leau, docteur es sciences. Librairie Hachette et C.^{ie} Paris. Prix: 1 franc.

Bibliografía

EL AVARO, *comedia en cinco actos de Molière, traducción esperanta de Samuel Meyer*. Librería Hachette y C.^a París. Precio: 0,75 fr.

Al fin vemos, con el mayor gusto, publicada la obra maestra del correcto traductor del «Viaje al rededor de mi cuarto». Ya era hora! Cuando leímos en «L'Esperantiste» que se había otorgado el primer premio del segundo concurso literario abierto por la Sociedad francesa para propagación del Esperanto, á la traducción de la célebre comedia de Molière, supusimos en seguida que se trataba de una verdadera joya literaria y sentimos vivísimo deseo de leer producción tan notable. Dos años hemos aguardado, pero la delicia que causa saborear las bellezas de tan hermosa comedia compensa suficientemente tan larga espera.

En «El Avaro» se admira una traducción fidelísima, estilo elegante y castizo y una corrección sin tacha. Basta comparar el texto original con la traducción, para convencerse de que todos los matices de dicción, belleza é interés de la comedia reaparecen con los encantos que presta un idioma tan rico y delicado como el Esperanto. Puede presentarse el «Avaro» á cuantos dudan de los recursos lingüistas de un idioma artificial, para probarles plenamente que la creación del Dr. Zamenhof nada tiene que envidiar á nuestras lenguas en la expresión de los matices más sutiles y variados.

Obras como «El Avaro» son necesarias para que el Esperanto alcance el crédito universal que el mundo exige para adoptarle unánimemente, y muy de desear es que los más acreditados esperantistas traduzcan las obras maestras literarias de sus lenguas nativas, para que el idioma internacional se difunda íntimamente en todos los países.

Extracto de la historia de la lengua universal por L. Conturat, doctor en letras y L. Leau, doctor en ciencias. Librería Hachette y C.^a París. Precio: 1 fr.

Ĝi prezentas la priskribon kaj kritikan juĝon pri kelkaj internaciaj lingvoj (Sotos Ochando, Volapük, Idioma Neutral kaj Esperanto), kiel modeloj de la sistemoj proponitaj por solvi la problemojn pri tutmonda interkomunikigo, kaj ĝi estas bonega eliro el «Historio de la tutmonda lingvo», verko, kiun ni ekzamenis en ĉi tiu gazeto. Pro sia malmulta prezo, ĝi povas utili por konvinki la instruitulojn pri la bonajoj de nia ideo.

Cikado ĉe formikoj, unua akta komedio de E. Labiche kaj E. Legouvé, kuntradukita de diversaj Chaumont'aj Esperantistoj. Librejo Hachette kaj K.^o Parizo. Prezo: 0,60 frankoj.

